# Salutmesaĝoj

Jen la alveno de iom da stabileco kaj reordigo al la brazila junulara movado. BOJE, ve! mi intencas diri BEJO, aktiviĝas kaj alvenas al sia tridekjariĝo. Kvankam ĉio estis en ordo, estis antaŭe plendo pri malagemo. Danke al tre profitdona rilato kun BEL; helpe de ĉiuj plej modernaj rimedoj (fakso, elektronika poŝto, interreto — mi scias ke iu priridos nin en la kvardekjariĝo pri tio), ni sukcesas nuntempe rapidajn kaj efikoplenajn kontaktojn kun la ceteraj eroj de la movado brazila, amerika kaj monda. Kaj per efikaj rilatoj ni volas alporti al agemo la plej renovigan kaj evolvigan forton de la movado, la junulojn. Ĉar ni scias ke estas la junuloj la indikantoj kaj enkondukantoj de tiuj ŝanĝoj, kiuj necesas por ke iu socio adaptiĝu kaj evoluu. Tion ni rigardcelas sen flankenlasi la amuzadon, ĉar ni scias ke al nenia celo indas alveni per serioza kaj ĉagreniga vojo.

Do, gesinjoroj, iru ni!

**Cláudio Zaina**
**Prezidanto de BEJO**

Ene de la 33-a Brazila Kongreso de Esperanto kaj 18-a Kongreso de BEJO, en Curitiba, konstateblas la firma paŝado de longdaŭra vojo kunlabora.

Sinteze en la historio de E-Movado elmontriĝas ke unuope grupoj, kluboj, asocioj kaj organizaĵoj agante kompletigas iasence la tuton. La karakterizo de unu ne malhelpas tiun de la alia... En tiu senco okaze de komuna efektivigo, kiel la nuna, eĉ se dumtempa, elmontras pozitivan atingon.

La kronologia riĉeco sub ĉiuj aspektoj de administrado, ene de la Federacia sistemigo, kiel libroservo, eldonado, informado, instruado, eventoj, departementoj kaj komisioj, reprezentas strebon kaj evoluigon je koncernaj etapoj de gradoj.

La vojo estas ampleksa... kaj kompleksa kaj dependas de ni ĉiuj, senescepte. NI LABORU KUNE!

**Symilde Schenk Ledon**
**BEL-prezidantino**

Mi tutkore gratulas al Brazila Esperantista Junulara Organizo okaze de la 30-a datreveno de ĝia fondo. Kvankam BEJO spertis en sia vivo leviĝojn kaj malleviĝojn de aktiveco, vi rajtas rerigardi al via ĝisnuna historio kun fiero. Multaj gejunuloj ricevis dank' al BEJO la ŝancon ĝui kaj praktiki Esperanton kaj labori por ĝia plivastiĝo.

Plua laboro necesas por plifirmigi la ligojn inter junaj esperantistoj de Brazilo kaj de la cetera mondo, sed oni jam estas sur bona vojo. Pri tio atestas, ke BEJO-ano fariĝis estrarano de TEJO. Sekva paŝo estos okazigo de Internacia Junulara Kongreso en Brazilo, esperebIe baldaŭ!

Junaj homoj ĉiam estis flagoportantoj en nia movado. Ludoviko Zamenhof estis lernejano, kiam li ekkreis nian lingvon, kaj 27-jara, kiam li lanĉis ĝin. Hector Hodler estis 20-jara, kiam li fondis UEA. Mi esperas, ke por la brazila kaj internacia movadoj kreskos el la vicoj de BEJO ĉiam pli da novaj aktivuloj, kiuj kun fervoro kaj freŝaj ideoj antaŭenigos nian aferon!

**Osmo Buller**
**Ĝenerala Direktoro de UEA**

# La Deklaro de Santos Dumont

## La Naskiĝo de BEJO

Konsiderante la gravan fakton, ke la Esperanto-Movado bezonas senĉese konstantan akceladon, kaj konsiderante, ke la junularaj Esperantistaj grupoj estas unu el la ĉefaj rimedoj por efektivigi tiun akceladon, kaj agnoskante, ke la esto de tut-Brazila junul-organizaĵo konsistigas neflankenlaseblan elementon por homogena agado en Brazilo, ni, junuloj, subskribintaj tiun ĉi deklaron, plene aprobas la fondon de tia organizaĵo nomota B.E.J.O. (Brazila Esperantista Junulara Organizo), fondas ĝin, kaj promesas labori en la kadroj de la programo por ĝi starigita en la unua estrara kunveno, okazinta en la 30-a de Julio de la 1967-a, en la II-a Seminario de Esperanto en la urbo Santos Dumont, MG.

Divino dos Santos, Cecilia Bernardes, Francisco Regadas, Helena Maria Fonseca, Carlos Mello, Gustavo Barbosa, Cesar Leal, Roberto Nogueira, Humberto Ferreira, Wilson Martins, Francisco Wechsler, Pedro Cavalcante, Aloísio Sartorato, Francisco Barbosa, Marcelo Garcia, Helder Lopes, Jair Sales, Paulo Viana, José Cabral, Luiz Evangelista, Aloisio Marques.



Partoprenantoj de la unua brazila junulara renkontiĝo

El Impulso, n-ro 2 /1979

